

B.K. 1972 poezio unua premio
Ueyama Masao – Japanio

Al la maro

Fonon ĉielan lumo paŝtelas,
nokto glacia fade degelas.

Spiro de l' viv' eksonas andante,
dormon de l' tero softe rompante.

Rosojn zefiro flege rulrulas,
fonto ekfluŝtras, flu' sin stimulas.

Pasis for longa, vintra obskur',
takte ekpulsas kor' de l' natur'.

Per milda tuŝ'
de l' luma duŝ'
sopiron
maten' ekscitas.

Per lummesaĝ'
al la vojaĝ'
la rojon
printemp' invitas.

Gajaj alaŭdoj solfeĝas soprane,
lirlas la rojo kompane.

Voĉo de amo ĉe rozo kontraltas,
revon al flugo ekzaltas.

Ĥoro de kraboj en kampo kolzflora,
fone kverado minora.

Kaj dum kresĉendas la ton' de l' koncerto
kreskas esper' en la verdo.

L'abismo glaŭka...
sin indicas el la fund'
tenebro faŭka.

Hurlas flu'
batas pluv'!
Muĝas vent',
fuĝas sun'
en nubaron,
kiun kirlas
man' giganta.

En la inund',
kvazaŭ kun sanga vund'
popol' ribelanta,
frakasi la jugon
celanta,
forfluas ĉio
kreita de la homa cerb',
leĝere pli ol pec' da herb'!
La natur' sin venĝas
kontraŭ la civilizacio.
Pri kio?

Kvartalo de drinkejoj dronas
en luma mar' brilanta flame.
Imagon pli fascine spronas
l' orgio neaŭdebla, tamen,

ebri' por vanta sinforlaso
nur veon, malesperon nutras,
en flata vort' de virinĉaso
fermentas pent', sincero putras.
Sen bru' la farson spegulante
sur si en la rebrilo bunta,
fluadas la rivero lante
tra l' spleno de vesper' profunda.

Nur la river' atingis l' estuaron.
Post la migrado sub la sun' kaj luno
tagfin' sufloras: Jam for la amaron!

Saluton nostalgian sur la duno
miskantoj velkaj per susur' esprimas,
kaj bremsas sin la rado de l' fortune.

La pintoj de l' ondetoj pale glimas
rulantaj sin al bordo de l' fatalo,
sub kiuj la pase' tavole ŝlimas.

Dum feblas sun' sinkanta, plumba vualo
kunfandas en leteo ambicion,
estingas l' eĥon de la vivbatalo.

Kaj ĝojon, triston, braĝan ampasion,
ĵaluzon, damnon ĉe l' perfido fia
enlasas en sin mute, glutas ĉion

l' azilo lasta, vasta, senpartia.